# *Hispanio kaj Kubo por pli ampleksaj rilatoj komercaj kaj entreprenistaj.*




A?toritatuloj de Hispanio informis pri la transdono de memorando-projekto al la ministro kuba pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca, kiu traktas pri industrio, turismo, energio, telekomunikoj kaj komerco.

En komuniko gazetara, precizigas la ministerio hispana pri industrio, energio kaj turismo, ke la proponoj estos analizataj de Kubo kaj poste subskribataj, kun la celo krei la ta?gan kuntekston por impulsi la reciprokajn rilatojn  jen politikaj jen entreprenaj.

Siaflanke, la kuba ministro, kiu plenumis oficialan viziton en Madrido, prezentis anta? centoj da entreprenistoj hispanaj la negoceblecojn en Kubo, en sektoroj de turismo, infrastrukturoj, transportoj, telekomunikado, renovigeblaj energifontoj kaj la speciala evoluzono de Mariel.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/64573-hispanio-kaj-kubo-por-pli-ampleksaj-rilatoj-komercaj-kaj-entreprenistaj

# Radio Habana Cuba